For linguistic justice in a multicultural world | since 1968 | esperantic.org

**President**
Humphrey Tonkin
**Secretary**
Derek Roff
**Treasurer**
Ben Speakmon
**Other Directors**
Anna M. Bennett
Wallace G. Du Temple
Mark Fettes
Grant Goodall
Geoffrey Greatrex
Esther Schor

**Advisory Board**
Ulrich Becker
Duncan Charters
Natalia Dankova
Probal Dasgupta
John Edwards
Alvino Fantini
Normand Fleury
Bonnie Fonseca-Greber
David Gaines
Gary Grady
François Grin
David K. Jordan
Sho Konishi
Katalin Kovats
Jed Meltzer
Lee Miller
Arika Okrent
Erin Piateski
Jonathan Pool
Timothy Reagan
Ian M. Richmond
Martin Schäffer
Klaus Schubert
Nancy Schweda-Nicholson
Bruce Sherwood
Allan Simon
Chuck Smith
Sebastian Tonkin
Bernhard Tuider

**Registered Office**
1015 15th Street, NW
Suite 1000
Washington, D.C. 20005, U.S.

**Administrative Office**
Charles Mays
16 Dixie Trail
Raleigh, NC 27607, USA
Chuck.mays@esperantic.org

Esperanto-Muzeo en Svitavy
Nám. Míru 81/1
CZ-568 02 Svitavy, Ĉeĥio



La 31an de aŭgusto, 2018

Karaj samideanoj,

Akceptu niajn elkorajn gratulojn okaze de la 10-jariĝo de la Esperanto-Muzeo en Svitavy. Dum la 10 jaroj de sia ekzisto la Esperanto-Muzeo fariĝis konata kaj profunde respektata institucio en Esperantujo kaj ekster ĝi: la muzeo ne nur helpas konservi kaj videbligi gravajn dokumentojn de Esperanto-kulturo kaj literaturo per impona kolekto de pli ol 16 mil eroj – ĝi ankaŭ ludas gravan rolon la disvastigo de la informoj pri la urbo, kaj la lando, pere de Esperanto. ESF fieras esti inter la subtenantoj de la muzeo je ĝia fondiĝo, antaŭ dek jaroj, kaj ankaŭ fieras kunlabori kun la muzeo dum la lastaj dek jaroj. Ĉi-jare, ankaŭ en septembro, ankaŭ ESF festas sian jubileon: la 50-jariĝon, tiel kreante inter la muzeo kaj ESF jen plian ligon. Ni elkore deziras al la muzeo, ĉiuj ĝiaj laborantoj, partneroj kaj sponsoroj multajn sukcesojn, kaj bonan daŭrigon en la venontaj jardekoj!

Sincere,

Humphrey Tonkin, kunfondinto kaj prezidanto de ESF

ELF★AREK
Esperanto
Ligo
Filatelista
★
Amika Rondo de
Esperantaĵ-
Kolektantoj

Tre Ĝentila S-ino
Pavla DVOŘÁKOVÁ,
ekspoziciestrino kaj redaktorino de
la muzeaj retejoj
Esperanto-Muzeo en Svitavy

Tre Ĝentila S-ino Libuše HÝBLOVÁ
Prezidanto de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Tre Estimata S-ro
Petr CHRDLE
Posedanto de la eldonejo KAVA-PECH

Triesto, la 12an de septembro 2018

Tre Estimataj!

Nome de ELF-AREK, Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj, mi ĝoje gratula vin ĉiujn pro la mirinda aranĝo okazonta post du tagoj en la bela urbo Svitavy, aranĝo kiun bedaŭrinde mi ne povos partopreni.

Tutkore mi bondeziras grandan sukceson al la evento kaj plie vin dankas, nome de ĉiuj filatelistoj-esperantistoj, pro la daŭra atento dediĉita al la Fako Filatelo kaj Kolektado per kaj por Esperanto, kio siamaniere - en la daŭro de la 130 jaroj - kontribuis, kaj ankoraŭ kontribuas, en la konstruado de la Esperanto-historio.

Estime,

*ELF-AREK–prezidanto*
*(Elda Doerfler)*

**Elf-Arek Prezidanto**
Elda DOERFLER
Via Ghirlandaio 18/1
IT-34138 Trieste
testudo.ts@gmail.com

Organo de la Asocio:
*La Verda Lupeo*
Redaktoro:
Rudolf BURMEISTER
Max-Müller-Str. 86
DE-09123 Chemnitz
rudolf.burmeister@arcor.de

**ttt-ejo de ELF-AREK**
**http://www.elf-arek.wz.cz/**

Österreichische
Nationalbibliothek

Kolekto por Planlingvoj
kaj Esperantomuzeo
Palais Mollard
Herrengasse 9
A-1010 Wien
Tel.: (+43 1) 53 410 731
Fakso: (+43 1) 53 410 733
www.onb.ac.at
bernhard.tuider@onb.ac.at

**Mag. Bernhard Tuider**
Teamestro
Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo

Al estimata sinjorino
Pavla Dvořáková
Esperanto-muzeo de Svitavy
Náměstí Míru 81/1
568 02 Svitavy

04. September 2018

Estimataj!

Okaze de la 10-jariĝo de la Esperanto-muzeo en Svitavy ni elkore gratulas vin!

Estas tre grave konservi kaj protekti la historiajn dokumentojn de la lingvo Esperanto. Jam multo perdiĝis. Tial la klopodoj de la Esperanto-muzeo en Svitavy por savi kaj dokumenti la Esperanto-kulturon estas tre valoraj kaj ĝojigaj.

Bondezirojn kaj multajn sukcesojn al la Esperanto-muzeo kaj al la urbo de Svitavy!

Sincerajn salutojn,

Bernhard Tuider

Karaj,

Nome de la teamo de la **Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet en Kortrijk, Belgio**, mi gratulas la kolegojn de la Esperanto-Muzeo en Svitavy. Eble, malgraŭ la distanco kaj la limigitaj rimedoj, iam estos iu kunlaboro.

En Kortrijk ni nun estas konstruantaj katalogon por la ne-libroj kaj ne-revuoj. Ĝi tute ne estas finpreta, sed ĝi jam konsulteblas jehttp://archivo.alcl.be kaj eble enestas eroj montrindaj dum via festo.

Kun koraj salutoj,

**Roland Rotsaert**
https://sites.google.com/site/esperantokortrijk/

---

Mi gratulas pro la 10-jarigho de vere grava institicio kun kiu ankau mi kunlaboris (pri denaskaj esperantistoj) kaj espereble foje denove kunlaboros.

**Zlatko Tiŝljar, ĝenerala sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio**

---

Geamikoj!
Mi tre gojas, ke jam 10 jaroj funkcias esperanta muzeo.
Pri tiu muzeo ni informas : www.fondumozamenhof.pl
Bedaurinde mi ne vizitis Esperantan Muzeon en Svitavy, sed mi volonte veturos al Svitavy kaj vizitos ĝin. Mi pensas, ke tio estos en la jaro 2019.
Pri via muzeo mi diros ce la Bialistoka Esperanto Tagoj en Bjalistoko en decembro.
Mi kore salutas vin kaj deziras multe da sukcesoj!

**Stanisław Dobrowolski,**
**prezidanto Fondumo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko**

---

Karaj prizorgantoj de la Muzeo en Svitavy,

Antaŭ du jaroj mi havis la okazon viziti vian muzeon, revene de la UK en Nitra. Estis tre interese, vi tre agrable akceptis nin kaj vi bele montris la kolektojn, la specialajn objektojn, la porokazajn elmontraĵojn.

Mi ne dubas, ke estas same interese nun viziti la lokojn. Mi tiam tre ĝuis la viziton. Bedaŭrinde mi ne povos veni al via festo. Sed mi sendas miajn varmajn bondezirojn al vi, dezirante sukcesan festadon de tiu datreveno! Belan dekjariĝon de la Muzeo!

Amike,

**Claude Nourmont iama estrarano de UEA i.a. pri kulturo**

De :
**INSTITUTO ZAMENHOF**
**Lomeo, TOGOLANDO**
Al :
Esperanto-Muzeo en Svitavy
Nám. Míru 81/1
CZ-568 02 Svitavy
**muzeo@esperanto.cz**, **cea@esperanto.cz**

Estimataj geamikoj,

Mi shatus per tiu chi mesagho saluti kaj gratuli vin pro la dekjarigho de via muzeo. Certe dum tiuj dek jaroj la muzeo ebligis multon bonan al la vizitantoj, kiuj tre kontentas pri ghia funkciado. Tio montras ankau la kontribuon de Esperanto al la monda kulturo. La salutojn kaj gratulojn mi sendas al vi ankau en la nomo de Instituto Zamenhof, kies adminstranto mi estas.

Mia instituo ekfunkcis la 13an de septembro 2004 en la chefurbo Lomeo de Togolando. En ghi lernas infanoj kaj junuloj legi kaj skribi. Estas la baza kaj mezgrada niveloj. Averaghe 500 gelernantoj estas chiujare en la instituto studantaj. Proksimume duono de tiu nombro lernas ankau Esperanton. Esperantistoj en Togolando uzas tiun chi lernejon por disvastigi Esperanton en Togolando. Eble iom pri mi mem vi shatus scii.

Mi estas GBEGLO Koffi, 61-jara viro, esperantisto ekde 1984. Mi jhus pensiighis de mia matematika funkcio en shtata lernejo mezgrada. Mi havas unu filon kaj unu flinon, ambau espeprantistoj.

Agrablan feston mi deziras al la muzeo.

Gbeglo Koffi

---

Estimataj gesamideanoj,

Ni ricevis vian mesagxon, kiu ege gxojigis nin, cxar tio pensigis nin ke ankau aliaj esperantistoj sentas same kaj pensas pri ni en tiu grava momento, kiu estas nia tutlanda E-kongreso.

Ni tre dankas vin pro tio, kaj ni esperas, ke ni trovos okazon kunlabori kaj renkontigxi en aliaj esperanto - arangxoj.

Ni salutas kaj gratulas vin pro la deka datreveno de la Esperanto-Muzeo en Svitavy.

Kun verdaj salutoj,

**Aurora Bute**
**prezidanto de Esperanto-Asocio de Rumanio**